# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 50, Numero 5, Majo 2017*

**Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Bonvenon

Ĉi tiun numeron de Telopeo redaktis Jonathan Cooper, prezidanto de la Federacio, ĉar Dmitry Lushnikov, kutima redaktisto kaj vicprezidanto, vojaĝis al Eŭropo. Fakte, nia kasisto Alan Turvey ankaŭ vojaĝis eksterlanden, al Japanujo, pro la invito de grupo de japanaj radioamatoraj esperantistoj.

## Nova ramplo ĉe Esperanto-Domo



Por tiuj, kiuj havas malfacilon eniri Esperanto-Domon, pro la betona ŝtuparo, ni nun havas dupartan moveblan ramplon (vidu la bildon). Ĝi estas trovebla en malhelblua sako sub la interna ŝtuparo. Se vi bezonas uzi ĝin, bonvolu sonigi la elektran zumilon apud la antaŭa pordego.

## Gastoj

Niaj eksterlandaj gastoj ĉi-monataj estas Juto kaj Fanjo Kaŭabata el Japanujo (29-a de aprilo ĝis 7-a de majo) kaj Marc Cuffez el Belgujo (10-a ĝis 21-a de majo). Juto kaj Fanjo partoprenis en la pico-vespero (29-a de aprilo), la lingva festivalo en Liverpool (6-a de majo) kaj la monata kunveno (7-a de majo).




*Kelkaj vizitantoj ĉe la pico-vespero. Juto staras ĉe la dekstro, kaj Fanjo, trie de la dekstro*

## Junia kunveno

La venonta kunveno ĉe Esperanto-Domo okazos la 4-an de junio. Ni invitas vin ĉiujn alporti malgrandan objekton, kiu havas ian signifon por vi, kaj paroli (en Esperanto, kompreneble) pri ĝi, kaj

pri kial ĝi estas signifoplena por vi, dum unu ĝis tri minutoj. Poste, aliaj eble faros demandojn. Bonvolu ne alporti ion multekostan aŭ facile rompeblan. Poste, se estos sufiĉa tempo, ni ludos la amuzan ludon, Tabuo-n.

## Membrokotizoj

Dankon al ĉiuj, kiuj jam remembriĝis. Se vi ankoraŭ forgesis, ne estas tro malfrue:
Iru al esperantohouse.org.au/about-us/join
Ni akceptas pagon per kreditkarto, PayPal aŭ ĝiro.

## Esperanto-Domo merkrede

Esperanto-Domo kutime estas malfermita ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00. Tamen, ĉar du estraranoj estas nun eksterlande, tio ne certas. Bonvolu kontroli unue, ĉe esperantohouse.org.au/news.

## Kunvenoj

**Esperanto-Domo**
Je la 1-a dimanĉo monate
Por estraro kaj membroj: 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj: komenciĝas per senpaga manĝeto, 13:00 ĝis 15:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941
nsw@esperanto.org.au

**Centra Marbordo / Novkastelo**
Je la 3-a dimanĉo monate, 11:45 ĝis 13:45
Ĉe Albert's Cafe, 3 Railway Square, Wyong
Kontaktu Joanne Cho 0413 087 340
centralcoast@esperanto.org.au

Novkastelanoj, kontaktu Andrew Spannenberg (02) 4951 2084 newcastle@esperanto.org.au

**Manly**
Je la 1-a kaj 3-a sabatoj monate, 10:00
Ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
Komencantoj bonvenaj
Kontaktu Roger Springer (02) 9976 6320
manly@esperanto.org.au

**Suda Marbordo: Bega**
Kunvenas foje. Komencantoj bonvenaj
Kontaktu Paul Gorny (02) 9496 0395 aŭ Penny Vos (02) 6495 2922


**Kanbero**
Je preskaŭ ĉiu ĵaŭdo, 17:00
Ĉe The Pancake Parlour, 122 Alinga St, Civic
Kontaktu Huigh Malcolm (02) 6288 4334
canberra@esperanto.org.au

**Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo**
Esperanto-Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016
tel: (02) 9319 4775
retejo: EsperantoHouse.org.au
retpoŝto: nsw@esperanto.org.au

**Prezidanto**: Jonathan Cooper
**Vicprezidanto**: Dmitry Lushnikov
**Sekretario**: Nicole Else
**Kasisto**: Alan Turvey
**Estraranoj**: Richard Delamore, John Casey



Amikumu estas apo (poŝtelefona aplikaĵo), kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn – ĉiam, ĉie!




Esploru profilojn kaj esprimu vin

Trovu esperantistojn apud vi ĉiam, ĉie

Konatiĝu kaj renkontiĝu!

Elŝutu Amikumu
iPhone 4S aŭ iPad 2+:
Android (OS 4.0.3+):

La utileco de tia aplikaĵo por esperantistoj estas klara, iusence ĝi estas ĝisdatigo de la plej malnova servo de UEA, la Delegita Reto, kiu same celis plifaciligi kontaktojn inter homoj dum vojaĝoj aŭ pri komunaj interesoj.
– Mark Fettes, la Prezidanto de UEA

En Londono, mi trovis esperantiston apude per Amikumu kaj ni renkontiĝis tutsimple tiel.
Mi apenaŭ povas atendi por uzi ĝin denove!
– Orlando Raola, Prezidanto de Esperanto-USA

## Por disvastigi Amikumu

Plusendu ĉi tiun flugfolion al ĉiuj konatoj per retpoŝto, fejsbuko kaj tvitero.
Plusendu ĉi tiun flugfolion al la organoj de via loka movado.
Printu ĉi tiun flugfolion kaj diskonigu ĝin ĉe via loka klubo.

Se vi volas kontakti la teamon de Amikumu pri gazetaj anoncoj aŭ demandoj, bonvolu retpoŝti nin ĉe

info@amikumu.com
amikumu.com
www.facebook.com/amikumuapp

La Oficiala Sponsoro de Amikumu estas la Universala Esperanto-Asocio